


N-ro 184 Septembro 2005 (3)

# La Migranto

Naturamika Internacio Esperanto Fako TANEF

# La Migranto

*Ligilo de la Esperantistaj Naturamikoj.*
*Eldonita kun aprobo kaj interkonsento de la Naturamika Internacio .*

Eldonanto TANEF
Apermonatoj
marto, junio, septembro, decembro.

Redaktofino
ĉiam la 1an de la antaŭa monato.

Naturamika Internacio-NAI
Ĝen. Sekretario: Dr. Christian Baumgartner
Diefenbachgasse 36, A-1150 Wien,Aŭstrio

Internacia fakreferanto :
Vakas.

Ĉefredaktorino: Antje Noordewier-Jagtenberg
Emmalaan 7, NL-3832 AH Leusden,Nederlando
Retadreso: bart.noordewier@12move.nl

Redaktorino: Erna Döring
Klingelbergstr.11, CH-4056,Basel Svislando.

Redaktoro / Korektanto: Bert de Wit
Houtvaartkade 21, NL-2111 BR, Aerdenhout,
Nederlando.
Retadreso: ajf.dewit@wanadoo.nl

La aŭtoroj mem respondecas.

Kasisto/abonanto-administracio :
Eric Baert, Rue des Taillis 23
BE-1420 Braine L'Alleud BELGIO.
ĝirkonto: n-ro 7543982 nome de "La Migranto"
Rue des Taillis 23, Braine L' Alleud BELGIO.
Rete : eric.baert@swing.be
Pagoj el eŭrolandoj sub mencio de Iban-nro :
Konto La Migranto NL 77 PSTB 0007543982
BIC:PSTBNL.21

UEA-konto tanf-a
Vi ne uzu la vorton "kotizo" aŭ"abono" sur via pagilo por eviti imposton. Se eble pagu al via landa peranto. La adreson vi trovas ĉiujare sur la koloraj paĝoj en la 4-a n-ro de La Migranto. Jarabono € 10

Presisto:
Grammé, Amersfoort, Nederlando.

Ĉi tiu gazeto estas presita sur medioafabla papero sen kloro.

**Ricevitaj gazetoj, revuoj, k.a.**

Esperanto '94. La Verda Stelo 32
Horizon.*taal* nr-o 214. julio/aŭg. 2005
Internacia Fervojisto 2005.4/5
Internaciisto 4
Kajeroj el la Sudo nr-o 67a
Katolika Esperantisto 189
La Kancerkliniko 115
La Sago 15, 16, 17
La Verda Proleto 426
Le Monde de l 'Espéranto 551 – 552
Panorama van de Europese Unie
Reizen in Europa. (Nederlandlingve)
Revuo Esperanto 1182 – 1183 nr-o 7 -8
Sennaciulo nr- o 6 (1200), nr-o 7-8 (1201-2)
SLEA Informilo 4, septembro 2005

**Enhavo:**

Kien? Situacio de Tanef kaj LM. 3
Proklamado de la 10ª Pejzaĝo de 4
La Jaro de INFI 5
Bildoj de la Pejzaĝo de la Jaro2005 6
Naturamikaj Domoj en la Ĵuraso
Maroko, la nova partnero NFI 7
Vojaĝi en nekonata Maroko
Kipraj Naturamikoj 8
Esperanto malpermesita antaŭ 70 jaroj en Germanio 9
Iom pri niaj malsovaĝaj kolomboj 10
Transloĝiĝo de la internacia Esperanto
Muzeo – Dua Zamenhof-statuo en Ĉinio 11
Dulingve – Ĉesigu la subvenciojn! 12
Drama fino – Lasero-bastono
Radio Vatikana en Esperanto 13
Mondfama ĉevalfoiro en Sudlareno 14
La muzikgrupo Desperado ne plu 15
E – Kulturcentro en Krakovo
"Espero.com.cn" nova gazeto Ĉinio 16

**La frontpaĝo montras akvofalon en la rivero Doubs, kiu formas la limon inter Francio kaj Svislando en la Ĵuraso. Foto: Hans Peter Senn, Svislando.**

# KIEN ?

Ĉi tiu komenco sugestas ke vi nun trovus allogajn turismajn celojn por trapasi belveture aŭtunajn tagojn. Sed kontraŭe, nigraj nuboj pendas super la ekzistado kaj estonto de La Migranto kaj Tanef.

Tanef kaj ĝia ligilo La Migranto ne estas memstara asocio sed fakgrupo de la grandega turista kaj kultura asocio "La Naturamikoj " NFI en Vieno. Sekve la statutoj de NFI koncernas ankaŭ la esperantan fakgrupon.

NFI, ĝiaflanke, estas la kuniganta organizo de hodiaŭ preskaŭ 30 landaj naturamikaj organizoj, kiuj posedas multajn Naturamikajn Domojn kaj kabanojn. Aliaj fakgrupoj krom Esperanto estas i.a. akvokaj vintrosporto, fotado, kantado, popoldancado, montgrimpado.


Eble ne plu ĉiuj grupoj estas agemaj, la realaĵo estas ke dum la triajara NFI Kongreso (en la semajnfino de la 7a ĝis la 9a de oktobro 2005 en München ) estos voĉdonado por statutoŝanĝo. Se la proponoj de la NFI-estraro estos akceptataj, malaperos la fakgrupoj ; anstataŭigos ilin tempolimaj laborgrupoj. Bert de Wit informpetis ĉe la ĝenerala sekretario Christian Baumgartner, kio fariĝos la kondiĉoj por la starigo de tiuj novaj limigitaj laborgrupoj, sed ne venis rekte respondo. Ŝajnas ke ne ekzistas tiuj kondiĉoj kaj ili nur starigos laborgrupojn, kiuj rekte estas ligitaj kun agadoj de NFI. Tiu intenco de la NFI-estraro, forigi la internaciajn fakgrupojn, certe estis jam longe en preparado, ĉar post la fiasko de Dirk Willkommen kiel nia internacia fakreferanto, ni ricevis komunikon el Vieno ke ni devis atendi kun propono por nova fakreferanto ĝis la triajara Kongreso.

Praktike la propono por statutŝanĝo signifas ke ne estas sencoplena eldoni apartan gazeton se ni ne plu havus oficialan statuson en NFI aŭ nur pro supozata sinteno de NFI pri Esperanto.

Ĉu iu scias kunvenon kie grupo da esperantistaj naturamikoj povos pridiskuti la situacion aŭ ĉu vi havas ideon kion fari ?

Propono, ideo de Bert de Wit : Fuzio kun Sennaciulo aŭ alia gazeto (Laŭte ?) kaj en tiu gazeto fari naturamika(j) paĝo(j).

Skribu per (ret)poŝto al Bert de Wit aŭ Antje Noordewier. (adresoj paĝo 2.) A.N.




## Proklamado de la 10a pejzaĝo de la jaro de la Naturamika Internacio de la 12a de junio 2005 ĉe la Saut du Doubs

**La Ĵurasa Arko estis elektita de la Naturamika Internacio, kune kun la Naturamikoj el Francio kaj Svislando kiel pejzaĝo de la jaro 2005/2006. La proklama festo de ĉi tiu 10a pejzaĝo de la jaro okazis la 12an de junio proksime de la spektakla akvofalo Saut du Doubs.**

**Ĉirkaŭ 1000 partoprenantoj – Naturamikoj kaj geloĝantoj de la regiono – partoprenis tiun aranĝon. Je radianta suno ili venis piede, per ekskursboatoj, bicikle kaj per kanuoj al la proklama loko ĉe la pitoreska franc-svisa limrivero, kies transiro ĉe tiu loko eblas depost meze de majo per novkonstruita ponteto.**

### Granda ŝanco per naturkonvena turismo

Reprezentantoj el politiko kaj publikaj instancoj taksis en iliaj paroladoj la distingon de ilia regiono per la predikato pejzaĝo de la jaro, kiel grandan ŝancon por la regiono, kies potencialo por naturkonvena kaj daŭrigebla turismo ankoraŭ ne estas sufiĉe evoluigita. Ili precipe akcentis la transliman ĉirkaŭaĵon de la pejzaĝo de la jaro.

### Eŭropa interŝanĝo de spertoj inter la pezaĝoj de la jaro

Delegacioj el pluraj pejzaĝoj de la jaro alvojaĝis al tiu ĉi „Jubilea Proklamado" – el la Bohema Arbaro, el Malnova Flandrio kaj de la Mozo. La delegacio el la Lebusa Lando, la pejzaĝo de la jaro 2003/2004 – oficiale transdonis la stafeton al la reprezentantoj de la Ĵuraso.

Pro la „Jubileo" de la pejzaĝo de la jaro fondiĝis reto inter ĉiuj ĝis nun distingitaj pejzaĝoj por kontribui al eŭropa interŝanĝo de spertoj.

### Ĵuraso en la centro

La Ĵurasa Regiono kun ĝiaj pejzaĝoj de aparta ĉarmo kaj multspecaj kulturaj tradicioj publikiĝos tuteŭrope per tiu distingo de la pejzaĝo de la jaro kaj

lokigos la Naturamikajn aktivecojn en la centro.
Profundaj arbaroj, pitoreskaj rojaj valoj, lagoj, marĉoj, sekaj ŝtonmuroj, grotoj, subteraj riverfluoj kaj aliaj pejzaĝaj apartaĵoj atendas la vizitantojn. Tradicia metio kaj multspecaj agrikulturaj produktoj estas elementoj por naturkonvena kaj daŭrigebla turismo.

## Tradicion malkovri – Naturon travivi – Estontecon formi

Herbert Brückner, la prezidanto de la Naturamika Internacio, karakterizis la naturon kaj kulturon kiel kapitalojn de ĉi tiu translima regiono, ankaŭ por la estonteco kaj formulis la dezirojn de la Naturamikoj por la pejzaĝo de la jaro Ĵuraso:

„Ni Naturamikoj ŝatus, komune kun la homoj de la Ĵuraso, kunhelpi, surbaze de la ekzistantaj rezervoj, ellabori strategiojn por daŭrigebla regiona evoluado, tio signifas ellabori bonan estontecon. Celkonscio estas vivkvalito, regiona identeco. Protektado de la natura medio kaj sensiveco por kulturo samekiel regiona revalorigo kaj laborpostenoj".

La devizo de la pejzaĝo de la jaro Ĵuraso – *„Tradicion malkovri, Naturon travivi, Estontecon formi"* – estu efektivigota dum la venontaj monatoj kaj jaroj per diversmaniera agadkampanjo.
*(Tradukis Erna Döring)*

*Ĝisnunaj pejzaĝoj de la jaro*

1989 Konstanca Lago *(Aŭstrio,Germanio)*
1990 Novsidla Lago *(Aŭstrio,Germanio)*
1991/1992 Ajfelo-Ardenoj *(Belgio,Germanio, Francio, Luksemburgio)*
1993/1994 Odro-Enfluejo, Balta maro *(Germanio,Polando)*
1995/1996 Alpoj (Modelregionoj) *(Aŭstrio,Svislando)*
1997/1998 Mozo *(Belgio,Francio,Nederlando)*
1999/2000 Bohema Arbaro *(Aŭstrio,Ĉehio,Germanio)*
2001/2002 Malnova Flandrio *(Belgio,Francio)*
2003/2004 Lebusa Lando *(Germanio,Pollando)*




*Sur la bildo:*
*Jacques Leprince, prezidanto de NA-Francio.*
*Herbert Brückner, prezidanto de NAI*
*Jürg Zbinden, prezidanto de NA-Svislando*












## Bildoj de la proklamado de la pejzaĝo de la jaro 2005 kaj bildoj de Doubs







## Naturamikaj Domoj en la Ĵuraso

En la regiono de la « Pejzaĝo de la Jaro 2005-2006 » troviĝas diversaj Naturamikaj Domoj sed ĉiuj ĉe la svisa flanko, ne en Francio.
La rivero "La Doubs" la vivofonto de la Ĵuraso, formas la limon inter Francio kaj Svislando. Estas limtransira regiono kvankam la naturo ne konas landimojn ; do estas saĝe kunpreni vian pasporton.
Ĉe la svisa urbeto Les Brenets el la rivero Doubs estiĝas longa, mallarĝa lago, tre uzebla por akvosporto. Belega ŝipveturo kondukas vin al la Saut de Doubs. Tie la rivero falas 28 metrojn malsupren inter krutaj kalkrokmuroj.
Francoj kaj Svisoj konstruis imponan hidroelektran centralon, kiu formas la barilon de la baraĵlago kaj profitas ambaŭ de la produktita energio. En ĉiu sezono ĝi estas bona regiono por restadi.
En la apuda ĉirkaŭaĵo situas 5 domoj kun memprizorgo :

1. **Chalet de Chaumont,**
La Combe d'Enges,
CH-2067 Chaumont.
Tel. 0041 327536328
Inf. : Magdalena Bettinelli
CH-2016 Cortaillod
Tel. 0041 328422291
2. **Chalet La Serment,**
CH-2208 Les Hauts Geneveys
Tel. 0041 328532019
Inf. : Josette Droz,
Tel : 0041 329266851
Retadreso :
reservation@laserment,com
3. **Les Saneys, La Saignotte,**
CH-Les Brenets,
Tel : 0041 329321275
Inf. : Verena Gander,
Rue Jeanneret 30,
2400 Le Locle
Tel. 0041 329312081
4. **Mont Soleil,**
CH-2610 Mont Soleil
Tel. 0041 329413707
Inf. : Daniele Käser,
Bütenbergstrasse 31,
CH-2504 Biel
Tel. 0041 323415032
5. **La Prise Milord,**
CH-2123 St. Sulpice
Tel. 0041 328612942
Inf. : Anne Frey,
Rue du Chasselas 7a
Ch-2014 Bole
Tel. : 0041 328425993

## Maroko, Tiwizi Chtouka Ait Baha, la nova partnero NFI

En novembro 2004 NFI akceptis kiel novan partneron, la asocion "Tiwizi Chtouka Ait Baha" Maroko.
La traduko de Twizi estas solidareco aŭ pli libera " Helpo al memprizorgo". "Chtouka Ait Baha" estas la sudmaroka regiono al kiu tiu asocio rilatas sin kaj kiu situas de l'Atlantiko ĝis Antiatlaso. Tie estas ankaŭ la Nacia Parko "Souss Massa". La sidejo de Twizi troviĝas ĉirkaŭ 50 km-oj sudoriente de la urbo Agadir, en Biougra.
La asocio ekzistas el grupeto de ekspertoj en diversaj kampoj (edukado, saneco, junullaboro, turismo, teknikaj profesioj) kiuj donas al la multaj vilaĝaj asocioj de la regiono konsilojn, startigas kun

ili projektojn kaj daŭre akompanas ilin.
Dum la lastaj jaroj tiu sudmaroka kamparo suferas de longedaŭra senpluveco por kiu la agrikulturaj komunumoj serĉas rimedojn. Tio estas unu motivo kial Tiwizi nun ankaŭ deziras kontribui pere de mildturistaj aktivecoj por ke la popolo havu kromenspezojn. Oni intencas akirigi tion por la kamparanoj per gastigado kaj vojaĝakompanado de la gastoj.

## Vojaĝi en nekonata Maroko

La asocio jam havas spertojn pro kunlaboro kun franca vojaĝentrepreno. En majo 2005 aranĝis la francaj naturamikoj sub la gvidado de la NFI-vicprezidantino Michèle Davieau provvojaĝon kun Tiwizi al Sudmaroko. Ankaŭ Ingeborg Pint el la NFI sekretariejo en Vieno partoprenis.
La vojaĝo faris grandan impreson sur la partoprenintoj. Ili havis pere de la senperaj kontaktoj kun la vilaĝaj loĝantaro, enrigardon en la situacio de la regiono ĉe la rando de la dezerto kaj konatiĝis kun iliaj socialaj problemoj.
Kiel partnero-organizo de NFI deziras Tiwizi prizorgi vizitantajn naturamikajn grupojn. Kompetenta gvidanto kun turista sperto estos je via dispono. La koncerna artikolo en la NFI-bulteno tute ne informas pri la lingvo parolata dum la vojago kaj kun la gastigantoj. Maroko estas nun araba lando sed antaŭe grandparta franca protektorato. Certe ion de la franca lingvo restas sed kion pri la aliaj eŭropaj lingvanoj ? Eĉ inter la ligitaj UEA-landoj, mi ne trovis Marokon, do certe ne en tiuj foraj kamparanaj vilaĝoj.
Adreso : Asocio Tiwizi Chtouka Ait Baha, B.P.228
80350 Biougra, Province Chtouka Ait Baha, Marokko.
Rete : tiwizi@hotmail. com

## Kipraj Naturamikoj

Iniciate kaj helpe de Germanaj Naturamikoj, german-kipra forumo de NFI estis fondata en Kipro je januaro 2005 la Kipraj Naturamikoj. En majo 2005 ili estis akceptataj kiel partnera organizo de la NFI.

La celo estas stimuli la konscion de la kipra popolo por natur- kaj kulturriĉecoj de la insulo kaj per efektivigo de projektoj, konservadi ĉi tiuj kulturajn heredaĵojn en kunlaboro de scienculoj, publikaj instancoj,, aliaj organizoj kaj la loka popolo. Por realigi tion estu problemoj kaj solvoj montritaj, studvojaĝoj kaj laborkampoj organizotaj kaj prelegoj farotaj.
La asocio de la Kipraj Naturamikoj estas la unua media organizo en Kipro en kiu kunlaboras la turka kaj la greka popolgrupoj sur la insulo. Ili montras kiel sukcesplena tiu kunlaboro povas esti.
Adreso : Phivos Ioannides, prezidanto Naturamikoj, P.O.Box 22628
CY-1523 Nicosia, Kipro Cyprus
Rete:
pioannid@friendsofnaturecyprus.org

*(NFI-bulletin nr.25/Julio 2005)*

## Esperanto malpermesita antaŭ 70 jaroj en Germanio.

La 17-an de majo 1935 la tiama germana ministro pri scienco, edukado kaj popolklerigo Bernhard Rust, malpermesis la instruadon de Esperanto en germanaj lernejoj. Kiel kaŭzon oni en la dekreto menciis ke la uzado de Esperanto kondukus al "malfortigo de esencaj valoroj de la nacia karaktero" Per tio la subpremado de Esperanto, kiu ekis jam komence de la nazia regado en 1933, estis oficiale konfirmita.
Granda parto de la Esperanto-kursoj en la lernejoj finiĝis jam antaŭ la dekreto ; ankaŭ radio-kursoj ĉesis tuj post la nazia potencakirado. La ĉesigo de la lerneja instruado, kiu ekde la dudekaj jaroj okazis en pli ol cent lernejoj( !) en Germanio kaj la malebligo de organizita laboro terure trafis la Esperanto-movadon kun sekvo dum pluraj jardekoj, ja eĉ ĝis la nuna tempo.

**Forigo de la Esperanto-asocioj**
La subpremado de la laboristaj asocioj okazis inter marto kaj decembro 1933, tiam la posedaĵojn de Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) konfiskis la polico. La Socialista Esperanto-Asocio (SEA) decidis dissolviĝi , oni konfiskis la havaĵon de la eldonejo EKRELO kaj la agado de SAT estis ankaŭ malpermesata. Multaj el la aktivuloj de la laboristaj movadoj estis malliberigitaj, kelkaj mortis.
La Germana Esperanto-Asocio (GEA) devis laŭ junia dekreto de Heinrich Himmler, la gvidanto de la germana polico kaj de la nazia organizo "SS", dissolviĝi ĝis la 15-a de julio 1936 por eviti ŝtatan malfondon. Per tio finiĝis sub la nazioj la organizita laboro por Esperanto en Germanio.


**Adolf Hitler skribis en "Mein Kampf" pri Esperanto :**
Tiel longe, kiel la judo ne fariĝis la mastro de aliaj popoloj, li volenevole devas paroli ilian lingvon ; sed tuj kiam tiuj estus liaj servetuloj, ili ĉiuj devus lerni unu universalan lingvon (ekz. Esperanton!), tiel ke ankaŭ per ĉi tiu rimedo la judaro povus regi ilin pli facile!

**Dekreto de la Regna kaj Prusa Ministro pri Scienco, Edukado kaj Popola Klerigo, Bernhard Rust, de la 17-a de majo 1935 :**
La flegado de artefaritaj mondaj helplingvoj kiel la lingvo Esperanto ne havas lokon en la nacisocialisma ŝtato. Ilia uzado kondukas al malfortigo de esencaj valoroj de la nacia karaktero. Tial oni evitu ĉian subtenadon de instruo de tiaj lingvoj, porinstruaj klasĉambroj ne estu disponigataj por tiu celo.
El"Ulrich Lins : La danĝera lingvo"

La perdoj pro la nazia subpremado kaj la milito estis forte videblaj en la membronombroj, kiuj atingis malpli ol la duonon de la antaŭmilita tempo. Tio okazis en tuta Eŭropo.
Kunmetita teksto de Lu Wunsch-Rolshoven, Esperanto-Land, surbaze de la verko de Ulrich Lins, La danĝera lingvo.

**Iom pri niaj malsovaĝaj kolomboj.**

Urbaj kolomboj, kortaj, endomaj, poŝtaj, konkursaj, ĉiuj niaj malsovaĝaj kolomboj devenas el unu genro, nome la rokaj kolomboj.
Iam ili vivis en la regionoj apud la Mediteranea Maro, specifie en la meza oriento. Sed iliaj idoj disvastiĝis en la tuta terglobo.




La rokaj kolomboj estas grizaj kun nigraj strioj sur la flugiloj, la breditaj estas diverskoloraj. Ili devenas de kulturitaj kolomboj kiuj eskapis aŭ estis liberigitaj. Ofte ili tre similas la gepatrojn, inkluzive la nigrajn striitajn flugilojn. La turaj kolomboj kaj la turtoj tamen ne apartenas al la roka genro.
En la estinto kolomboj estis gravaj birdoj. Ili servis i.a. kiel kurieroj, viandprovizo sed ankaŭ pro la fekaĵo kion oni uzis kiel sterkaĵon. La egiptoj jam antaŭ 5000 jaroj konstruis turojn por nestiigi la kolombojn. La antikvaj grekoj kunprenis poŝtkolombojn al siaj olimpiaj ludoj por kiel eble plej rapide kumuniki pri la sukcesoj. La romianoj jam dum la komenco de nia erao bredis kolorajn kaj blankajn kolombojn. Plej verŝajne la krucbatalantoj aŭ kolportistoj enkondukis la kolombojn en Eŭropon. Dum la kavalira periodo oni uzis la bestetojn por novaĵtransporto, por la viando kaj por la multvalora sterko. Sed ... post nelonge estis malpermesate bredi ilin ĉar la birdoj manĝegis de la agrikulturaj kampoj kaj de la enurbaj ĝardenoj. Nur se iu posedas vastajn kampojn, oni akiris permeson por la bredado, Sekve tio estis nur kolomboj apud kasteloj, palacoj kaj monaĥejoj. Ankaŭ posedantoj de riĉaj somerdomoj konstruigis turojn por la birdoj. Tiaj turoj jam aĝas pli ol 500 jarojn kaj ĉiam la kolomboj nestis en ĝi.
Antaŭe nur por la riĉuloj, nuntempe miloj da enloĝantoj plenplezure kulturas la plej pompajn, la plej rapidajn aŭ la plej ĉarmajn birdojn. Longtempe antaŭ ol ekzistis telefono aŭ komputiloj, oni uzis la kolombojn kiel malkarajn kaj rapidajn kurierojn, ĉar kiom malproksime ili estas, ĉiam ili retrovis la hejmon.
En la antikva Sirio ekzistis kolomba servo inter Bagdad kaj aliaj urboj. La nederlandaj maristoj kunprenis nombron da tiaj raportistoj, kiuj baldaŭ estis nemankipovaj. Dum la 19a jarcento la gazetaro ofte ricevis la novaĵon pere de tiu vivanta rapida poŝto. La kolomboj flugas 100 km. en horo kaj 800 km. tage. Dum la dua mondmilito en Nederlando per verdikto estis malpermesate havi poŝtkolombojn.

La posedintoj devis mortigi ilin, nur kelkcentoj rajtis resti en zoologiaj ĝardenoj, sed ankaŭ ili dum la militjaroj devis foriri.
Post la milito la brita flugarmeo RAF donacis 3000 kolombojn al Nederlando por starigi la kolombaron. Per la helpo de la belgaj najbaroj, en kies lando la bredado dum la militjaroj ne estis malpermesata, oni rapide povis restarigi la unuiĝon de poŝtkolombaj prizorgantoj kiu nun nombras membraron de pli ol 56000.
Laŭ periodaĵo de sud-holanda medio-organizado, *(tr. A de Jong)*

## Transloĝiĝo de la Internacia Esperanto- Muzeo en Vieno

Por la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj en Vieno komenciĝos nova fazo. Ni transloĝos en la sekvaj monatoj al pli taŭga kaj multe pli facile alirebla loko. For al la sennombraj ŝtupoj en la malnova konstruaĵo !



*La fasado de la palaco Mollard. (Esperanto- Muzeo)*

Temas pri nove restaŭrita palaco en la centro de Vieno, tute proksima de la nuna situo
Jen la nova adreso : Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo,
Palais Mollard
Herrengasse 9
1010 Vieno, Aŭstrio.
La deĵoraj horoj kiuj validos nur ekde la remalfermo en novembro
Lun.-merkr, vendr.-sab. 10h-14h.
Jaŭde 15h. 19h.
**Sed bonvolu direkti ĉiujn sendaĵojn al la sekva adreso :**
Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo,
Josefsplatz 1,
1010 Vieno,
Aŭstrio.

## Senpere el la taga gazeto.

La dogano sur la germana flughaveno Frankfurto arestis Kroaton kiu kunprenis du kofrojn, enhavante entute 375 endanĝeritajn testudojn.
La bestoj estis parte kunligitaj per glubando kaj kaŝitaj en jutosakojn. Laŭ la dogano jam 30 bestoj estis mortaj kiam la kofroj estis malfermitaj.

## Dua Zamenhof-statuo en Ĉinio.

La 28-an de aŭgusto 2005 estis starigita nova Zamenhof-statuo en la kultura palaco de la ĉina urbo Zaozhuan. Tiu statuo estas la dua en Ĉinio. En la inaŭgura ceremonio partoprenis s-ro Yu Tao, estrano de UEA kaj ĝenerala sekretario de Ĉina E-Ligo, kaj lokoj esperantistoj.


## Dulingve/ Franca-Hungara

En franca societo en Budapesto por la fabrikado de bestaj medikamentoj, oni bone komunikis per la hungara kaj la franca lingvoj, tiu lasta estanta tradicie lernita tie. Sed en 1996 la direkcio de la sidejo en la franca urbo Bordozo ordonis ke la raportoj, ĝis tiam verkitaj en la franca kaj hungara lingvoj, estu redaktitaj en la angla. Iom post iom oni maldungis la france parolantojn por dungi angle parolantojn. De post tio okazis gravaj kunfuzoj pro la malbona regado de la angla. Por ŝanĝi tion estis dungita (kun bonegaj salajroj) kadro el Aŭstralio kiu devas korekti la anglajn erarojn en la dokumentoj internaj kaj eksternaj. La premo devigi al la franca personalo nur uzi la anglan lingvon estas enorma. Antaŭ nelonge la lasta dulingva lernejo franca / hungara en Budapesto, finance helpita de la franca ambasado por 12000 eŭroj, estis nuligita kaj fermiĝis. Ĝi estis anstataŭigita de angla/hungara jam ekde la lernejjaro 2004 - 2005, finance helpita de Usono...

*(El "Esperanto La Verda Stelo" nr-o 32.)*

## Ĉesigu la subvenciojn !

Jare landoj en la Eŭropa Komunumo transportas ĉirkaŭ 200 000 vivantajn bovojn al Libano. Ĉi tiuj transportoj estas rigardataj kiel la plej skandala brutkomerco. La vojaĝoj povas daŭri (el Irlando) ĝis dek tagoj. Multaj bestoj alvenas streĉitaj, elĉerpitaj aŭ senhidratiĝintaj. Post la alveno atendas ilin kruela pritraktado kaj senpera buĉado.




Kamionoj, ŝarĝitaj per bovidoj nur kelkajn tagojn aĝaj, ĉiutage forveturas de Pollando al nederlandaj grasigejoj. Post kelke da tempo ili denove, nun grasaj, estos tranportitaj al francaj buĉejoj, ĉar ĉi tiuj entreprenoj estas iom pli malmultekostaj ol en Nederlando.

Tiu kruela komerco de vivantaj bestoj estas malavare subvenciata de la Eŭropo Komunumo pere de nia impostmono ! Por la organizo CIWF (Kompato pro monda brutbredado) subtenita de landaj asocioj, ĉi tiuj transportoj estas en 2005 tikla afero kaj la celo de publikaj agadoj sub la devizo : Ĉesigu tiujn subvenciojn !

Je la 8a de julio la Eŭropa Parlemento akceptis t.n. «skriban deklaracion » en kiu estis alvoko fini tiujn subvenciojn. Sed bedaŭrinde oni ankoraŭ ne unuece povis reale decidi por ĉesigi tiun malindan komercon.

*(El " Vroege Vogels Nieuwsbrief" Radio-elsendo 7-8- 2005.)*

## Drama fino por la legenda flandra Donna



Donna mortis. La famkonata flandra cikonio estis elektroekzekutita trovita en la nordo de Francio.
Donna naskiĝis en la zoologia ĝardeno de la belga urbo Mechelen "Plankendael" kaj estis tie ekipita per satelito - sendaparato. Ek de tiam scienculoj povis sekvi ŝiajn migradojn dum 2033 tagoj.
Rekorda tempo en la birda mondo ! La pereiga vojaĝo de Donna komenciĝis la 11an de februaro 2005. Tiam ŝi startis norden el sia travintra loko sude de la hispana urbo Sevilo.
Elektro-ekzekutado pro kontaktiĝo kun elektraj dratoj estas la plej grava mortkaŭzo de cikonioj.
www.ooievaars.vlaanderen.be

## Lasero-bastono forpelas birdojn

La franca flughaveno de Montpeliero estas konata de multegaj kunpuŝigoj inter flugmaŝinoj kaj birdoj. La situo de la flugejo ĉe la naturregiono « La Camarque » certe kontribuas al tio. Oni testis novan metodon por eviti kunpuŝigojn. Por la unua fojo en la historio estis uzataj lasero-radiadoj por forpeli la birdojn.
Dudek centimetrojn larĝa radiado movas sin 24 horojn tage super la alteraĵojn tien kaj reen. Laŭ Jean-Luc Briot de la flughaveno estas la radio speco de sendoloriga bastono kiu timigas la birdojn. Granda avantaĝo estas ke la birdoj ne alkutimiĝas al ĉi tiu "tuŝo". La aŭdigo de birdsonoj aŭ pafbruo ne plu havis efikon post kelka tempo.
La sistemo nun funkciis tutan jaron en la flughaveno. Interne de la atingo de la laseraparato ne okazis kolizio inter flugmaŝino kaj birdo en tiu periodo.
*www.montpellier.aeroport.fr*

### Radio Vatikana en Esperanto.

| Tagoj | Frekvencoj |
|---|---|
| **Dimanĉe** | **MO: 527 -1530 kHz** |
| **21,20-21,40 MET** | **KO: 4005 -5880 kHz** |
| **Merkredo** | **MO:1611 kHz** |
| **21,20-21,29 MET** | **KO: 7250 - 9645 kHz** |
| **Jaŭde** | **MO:1611 kHz** |
| **21,20-21,29 MET** | **KO: 7250 – 9645 kHz** |

*MO= Mezaj Ondoj KO= Kurtaj Ondoj*
*MET= Mez-Eŭropa Tempo= UTC+1*
*( Ek de la 26a de marto ĝis la 29a oktobro= UTC+2)*

## Mondfama ĉevalfoiro en Sudlareno.

Certe nur malmultaj el niaj legantoj scias kie situas Sudlareno.
Tio estas vilaĝo en Drenthe, provinco en la nordoriento de Nederlando.
Inter la rivereto "Drentse Aa" kaj la "Zuidlaarder Meer" (lago) situas sur la norda pinto de la monteta kaj arbara regiono "De Hondsrug" la samnoma Naturamika Domo "De Hondsrug".


*Naturamika Domo " De Hondsrug"*

Veninte el la Nordlarena arbaro vi alvenas en la valon de la rivereto "Drentse Aa" kie en la marĉa fojno-herbejoj troviĝas pli ol 800 sovaĝaj plantospecioj. Post la Sudlarena Lago je la alia flanko de la rivereto "Hunze" komenciĝas la longaj kanaloj de la forfositaj torfejoj en la provinco Drenthe. Ĉi tiu provinco estas konata pro la multnombraj bonaj biciklaj padoj. Tie vi ankaŭ povas promeni laŭlonge de parto de "Pieterpad" (el Nord-Groningen ĝis la franca Marseille).
La Naturamika Domo "De Hondsrug" havas 46 litojn, estas ĉirkaŭita de granda teraso. Apud la domo estas kampadejo kun 10 lokoj por tendoj kaj ruldomoj. La domo estas malfermita por ĉiu, de marto ĝis la fino de oktobro, sed por grupoj la tutan jaron.

Ĉiam la trian mardon en oktobro okazas en la vilaĝo Sudlareno la plej granda ĉevalfoiro de Eŭropo.



Ĉi tiun jaron ĝi okazos por la 805-a fojo ; ĉirkaŭ 1900 ĉevaloj estos alkondukitaj kaj 150. 000 vizitantoj venos al la kutime tre kvieta vilaĝo kun la malnova vilaĝcentra placo (brink).
Samokaze estas festo , en 2005 de vendredo la 14an de oktobro ĝis merkredo la 19an, kun kermeso, granda varfoiro kaj subĉiela teatro.
Jam lunde alvenas kolonego de trenveturiloj kaj remorkoj. Ĉie laŭlonge de vojoj kaj stratoj ĉevaloj kaj akompanantoj forlasas la veturilojn kaj iras al la portempaj loĝejoj.
Sur la foiro la aĉetontoj, vestitaj en grizaj kiteloj, prijuĝas la bestojn, montrante kaj fojfoje frapetante sur ili per flaveta rotanbastono. Pro tiu ekipaĵo ili estas bone rekoneblaj. Maĉante sur dika cigaro, la venonta posedanto de la ĉevalo ordonas ke la besto trotu iom laŭ la elektita vojo. Atentu, ĉar sekvos ankaŭ galopo ! Post kiam ĉio okazis, tiam komenciĝos la ludo de laŭdi kaj marĉandi, akompanata per

kunfrapoj de manoj por interkonsento.

## Mitoj kaj legendoj.

La ĉevalfoiro konas diversajn mitojn kaj legendojn.
La fama ĉevalo de la kvar hejminfanoj estus aĉetita ĉi tie. Sur la ĉevaldorso la kvaropuloj eskapis el la persekuto de la imperiesto Karlo La Granda per salto trans la riveron " La Mozo"
Alia konata rakonto estas pri la heroo el la infankanteto *Berend Botje*, kiu ŝipveturis al Sudlareno kaj neniam revenis. Sur la foiro rakontiĝas varianto. Berend estis ĉevalkomercisto, kiu transloĝiĝis al Usono kaj en la ŝtato Kentucky fondis la plej grandan ĉevalfoiron en la mondo.

La Naturamika Domo "De Hondsrug" situas bicikle nur 5 km. de la foiro. Saturita de impresoj kaj kermesa tumulto vi retrovos tie la silenton.
Parte laŭ teksto de Bart Brinkman en "De Toorts" nr-o 4, septembro 2005. *(trad: A.N.)*

## La muzikgrupo Desperado ne plu ekzistas

Kiel anoncite ĉe IJK la koncertoj en Pollando estis la lastaj de la grupo "Esperanto Desperado".
La grupo ludis unue oficiale dum KEF-5 en 1996 en Kopenhago kiel "Brokantaĵo". En 1997 ili ŝanĝis la nomon al la nuna. Tiam la grupo konsistis el Brigitta Taurus Henriksen, Helle Eble Cleary, Amir Hadziahmetovic, Kim Henriksen kaj Dennis Rock Tampa kaj ili ludis akustike.

En la jaro 2000 la orkestro plene elektriĝis kaj eniris la grupon Brian Laustsen kaj Thomas Crawford. Tiam la grupo surbendigis la unuan kodiskon :
"jen venas ......Brokantaĵoj" ĉe la eldonejo Vinilkosmo. Denis intertempe iĝis rifuĝinto en Germanio kaj Brigitta forlasis la grupon.
Dum aŭtuno 2003 kaj printempo 2004 la grupo klopodis registri novan kodiskon. Sed la fermo de studio de polico, ŝtelado de akordiono k.t.p. malfaciligis la laboron. Sed en junio 2004 finfine ili sukcesis surbendigi "Hotel Desperado", eldonita la 20-an de aŭgusto 2004. Sur ĝi aŭdiĝas la drumisto Nis Bramsen, kiu estis en la grupo ekde januaro 2002. La lasta membro Mark Dziwornu (origine el Ganao) aliĝis al la grupo nur antaŭ kelkaj monatoj. Li ludis ĝembon kaj aliajn perkutilojn. Sed li jam gastludis en 5 kantoj en "Hotel Desperado".

La muziko kaj tekstoj plej ofte estis originale verkitaj de la membroj mem. Fakte eĉ tri el la membroj + unu eksmembro verkis la tekstojn kaj muzikon por la dua albumo. Sed de tempo al tempo aperis tekstoj de ekz. Georgo Kamaĉo, William Auld, Vladimir Danilov kaj Maria Amanta Smilet.
Esperanto Desperado ankaŭ ludis ekster la Esperanta mondo.

Ekz. vive en la Dana Radio, kiel festorkestro ĉe naskiĝtagoj aŭ geedziĝfestoj, en kafejoj, kulturdomoj, karnavaloj kaj ĉe festoj okaze de la unua majo. La ofta strategio estis ludi tie, kie jam estas homoj. En la Esperanta mondo la grupo ludis dum KEF-oj, KAFE, UK-oj, IJK-oj, PSI, Dana kaj Germana Jarkunvenoj.
Okazis ke nia ĝembisto estis resendita al Kopenhago el la flughaveno de Krakovo pro mankanta pola vizo. Sed kun rapida ago ĉe la pola ambasadejo kaj iom multekosta flugbileto, oni sukcesis flugigi lin reen al Pollando. Tiel li alvenis al la kongreso en Zakopano je unu horo antaŭ la lasta koncerto kun Esperanta publiko. Desperadoj ĝis la nokto-nokto fin'......

Esperanto Desperado dankas ĉiujn, kiuj apogis nin dum jaroj.
Helle Eble Cleary, Amir Hadzahmetovic, Brian Laustsen, Kim J.Henriksen, Mark Dziwornu, Nis Bramsen.
*(Fonto: Ret-Info Eventoj.)*

## Malfermo de nova E – kulturcentro en Krakovo, Pollando

La 28-an de aŭgusto 2005 okazis solena malfermo de la E – bazita internacia Centro de la Kulturoj en Krakovo-Ĉajovice. La centro funkcias ekde majo 2005. La aranĝoj okazas ĉiam danke al la kontribuo de eksterlandaj Esperantistoj kaj ĉiam en E, sed celas (pere de simultana interpretado) plejparte ne-esperantan publikon.

Kiel sidejon de la Centro oni elektis lernejon patronatan de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) en Ĉajovice apud Krakovo, sed la programoj okazados ankaŭ en la lernejoj de Krakovo kaj la regiono, en la universitato kaj en aliaj kulturcentroj. Eksterlandaj prelegantoj kaj gastoj ĉiam estas tre bonvenaj !!!
Maria Majerczak, direktoro ICK
Jolanta Traczyk, sekretario ICK
Rete: piotr.esp@gmail.com
*(Fonto: Ret-Info Eventoj.)*

## "Espero.com.cn", nova gazeto.

En la jaro 2000, la konata revuo "El Popola Ĉinio" ĉesis esti eldonita kaj aperis rete. Iuj legantoj tamen foje plendis ke ili preferu foliumi paperan revuon. Pro tio estas pretigita nova papera gazeto, kiu similas al la historia EPĈ. sed pli juna kaj pli bela.
La gazeto kun 64 paĝoj havas 12 partojn : politiko, ekonomio, retrorigardo, E-movado, kulturo, religio, vivo de ordinaraj ĉinoj, tradicio, arto, socio, E-libroj kaj legantorubriko.
Mendebla ĉe :
Distribua Fako de EPĈ,
P.O.Kesto77, CN-100037 Pekino, Ĉinio aŭ ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.